Luise Hensel,

Noktopreĝo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Lacas mi je l' tagofin'
Kaj mi ripozigas min.
Fermas la okulojn mi,
Gardu min, ho kara Di'!

Se maljuston faris mi,
Patro, ĝin indulgu Vi!
Via graco tiom da
Pekoj rebonigas ja.

Ĉiujn, kiujn konas mi,
Lasu nun ripozi, Di',
Ĉiujn homojn sur la Ter'
Nokte gardu de danĝer'!

Faru, ke malsana kor'
Resaniĝu, ho Sinjor',
Kaj ke de l' ĉiel' la lun'
Vidu sur la mondon nun!

Traduko de la Germana poemo "Nachtgebet" de Luise Hensel *(∗30.03.1798 – †18.12.1876) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-04.*

MR-075-4 / Arg-427-841 (2014-11-01 20:29:11)